der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde der DDR im Deutschen Kulturbund

4. Jahrgang Nr. 20/21 April 1968 50 Pfennig

Aus der VERFASSUNG DES SOZIALISTISCHEN STAATES DEUTSCHER NATION

Getragen von der Verantwortung, der ganzen deutschen Nation den Weg in eine Zukunft des Friedens und des Sozialismus zu weisen,

in Ansehung der geschichtlichen Tatsache, daß der Imperialismus unter Führung der USA im Einvernehmen mit Kreisen des westdeutschen Monopolkapitals Deutschland gespalten hat, um Westdeutschland zu einer Basis des Imperialismus und des Kampfes gegen den Sozialismus aufzubauen, was den Lebensinteressen der Nation widerspricht,

hat sich das Volk der Deutschen Demokratischen Republik,

fest gegründet auf den Errungenschaften der antifaschistisch-demokratischen und der sozialistischen Umwälzung der gesellschaftlichen Ordnung,

einig in seinen werktätigen Klassen und Schichten das Werk der Verfassung vom 7. Oktober 1949 in ihrem Geiste weiterführend,

und von dem Willen erfüllt, den Weg des Friedens, der sozialen Gerechtigkeit, der Demokratie, des Sozialismus und der Völkerfreundschaft in freier Entscheidung unbeirrt weiterzugehen,

diese sozialistische Verfassung gegeben.

Präambel der neuen Verfassung der Deutschen Demokratischen Republik

(Siehe Seite 13!)

Nova konstitucio en G. D. R. estas ellaborata

Jam delonge evidentiĝas, ke la nun ankoraŭ valida konstitucio en G. D. R. ne plu konformas al la nuntempa evolustato de nia respubliko. Pro tio necesis ellabori novan konstitucion, kiu unuflanke respegulas la grandajn akiraĵojn en la pasintaj 18 jaroj depost ekzisto de nia ŝtato kaj aliflanke fiksas novajn, akirendajn celojn. La popola parlamento en sia kunsido en decembro 1967 detale okupiĝis pri tiu demando kaj formis komisionon, al kiu apartenas personoj el ĉiuj tavoloj de la enloĝantaro. Krome en ĉiuj laborejoj, institucioj kaj organizaj rondoj kaj en domkomunumoj komencis granda diskutado pri la kreenda nova konstitucio. Fine de januaro ĉijare la parlamento jam povis okupiĝi pri la de la komisiono ellaborita projekto de nova konstitucio. Intertempe ĉiu familio ricevis projekton de la nova konstitucio kaj la granda popoldiskutado estas daŭrigata nun ĉefe pri la teksto de la unuopaj paragrafoj. Ekde decembro 1967 la gazetoj ĉiutage presas bilancojn de unuopaj personoj pri ilia evoluado dum ekzisto de nia ŝtato. Ankaŭ la nun ankoraŭ valida konstitucio estas analizata kaj ekde februaro niaj civitanoj diras sian opinion pri la projekto de nova konstitucio. Ankaŭ modifproponoj estas farataj.

Nia nuna konstitucio estis kreata dum marto 1949 de la tiama Germana Popolkonsilantaro post diskutado en pli ol 9000 kunvenoj. 503 modifproponoj estis faritaj. Pro tio 52 el 144 paragrafoj estis modifitaj. La Germana Popolkongreso en majo 1949 konfirmis la konstitucion.

En tiu jaro la registaro de la Unuiĝintaj ŝtatoj de Ameriko en interkonsento kun rondo de la okcidentgermana monopolkapitalo fendigis Germanion per kreado de la Bonna separatŝtato. Per la konfirmo de la Parizaj Kontraktoj flanke de la tiama Adenaŭer-registaro kaj la 3 okcidentaj imperialismaj ŝtatoj la fendigo de Germanio estis pliprofundigata. Motivo por la fendigo estis, fari el Okcidentgermanio bazon de la imperialismo kaj baştionon en la batalo kontraŭ la socialismo. Tio kontraŭis al la vivinteresoj de la nacio.

La fendigo de Germanio flanke de la Bonna separatŝtato necesigis fondon de fakte demokrata ŝtato en tiutempe de Sovetunio okupita Orientgermanio. La Germana Demokratia Respubliko konstituiĝis la 7. 10. 49. Ĝi transprenis la konfirmitan de la Germana Popolkongreso konstitucion. Ekde 1955 ĝi posedas plenan suverenecon.

1949 tiu konstitucio estis granda progreso. Ĝi estis la unua kontraŭmilita konstitucio en Germanio kiu ne nur donis formalajn rajtojn al la civitanoj. Ĉiuj donitaj rajtoj estas realigitaj. Multaj direktivoj el tiu konstitucio jam delonge estas realeco. Ekzemple laborleĝo, citita en paragrafo 18, jam ekzistas depost 1961 post intensa diskutado en laborejoj. Paragrafo 16 deklaras ĉiun dimanĉon kiel ripoztagon. Sed krome jam depost septembro 1967 ĉiu sabato estas ripoztago.

En la jaro 1949 ekzistis ĉe ni kontraŭfaŝisma demokrata sociordo. Pezindustrio sur teritorio de G. D. R. preskaŭ ne ekzistis. El ruinaĵoj sub tre malfacilaj kondiĉoj dum la pasintaj 18 jaroj estas kreita floranta industrio kaj ni nun troviĝas inter la 10 gvidantaj industriŝtatoj en Europo. Iamaj privataj industrientreprenoj nun estas duonŝtataj per ŝtata financa partopreno je pli ol 50 %. Tio signifas, ke tiuj industrientreprenoj precipe ŝtate estas gvidataj kaj partoprenas socialisman planekonomion. Multaj iamaj entreprenistoj estas komanditistoj. Ilia laboro ne plu sole servas al privataj celoj, sed al la komunaj strebĉoj por evoluado de la produktivfortoj kaj al la pliigo de la socia proprieto. La „Unuiĝoj de popolpropraj uzinoj" helpas al tiuj duonŝtataj industrientreprenoj, transiri al modernaj teknikaj metodoj kaj atingi preskaŭ saman altiĝon de la laborproduktiveco kiel la popolpropraj uzinoj. La laboristaro en duonŝtataj industrientreprenoj ĝuas samajn rajtojn kiel tiu en popolpropraj fabrikoj.

Granduzinoj post 1945 estis deklaritaj kiel popolproprajo. Ankaŭ bienuloj, posedintaj pli ol 100 hektarojn, estis senpropriigitaj kaj la grundo disdonita inter kamplaboristoj kaj etkamparanoj. La senpropriigo de tiuj bienuloj necesiĝis, ĉar laŭ historiaj spertoj ili uzis sian potencon por reakciaj agoj kaj en tiaj bienoj kolektiĝis la kontraŭrevoluciuloj. Sekve la senpropriigo servis al la fortikado de la popolregistaro. Sed ĉar depost jarcentoj la kamplaboristoj postulis propran grundon kaj la etkamparanoj sufiĉe da propra grundo, ne eblis tuj popolapartenigi la grundon kiel sub aliaj historiaj kondiĉoj en Sovetunio, malgraŭ ke la agrarreformo ne estis socialista decido. Sed ĝi estis grava premiso, por realigi pliajn socialismajn reformojn.

1949 la unuopaj kamparanoj grandparte senmaŝine prilaboris la teron. Sed jam 1952 fondiĝis la unuaj agrikulturaj kooperativoj. Ekde 1960 ĉiuj kamparanoj aliĝis al tiuj kooperativoj kaj la kampoj estas kulturataj per grandmaŝinoj. Per tio la rikoltoj multe pligrandiĝis. Ankaŭ fondiĝis kooperativoj de ĝardenistoj, metiistoj, fiŝistoj ktp. La vivmaniero de la kamparanoj de post tiam profunde ŝanĝiĝis. La tekniko grandskale estas aplikata en la kooperativoj, ankaŭ rilate bestbredadon, kaj anstataŭas antaŭan manlaboron. La kooperativanoj ne plu laboras de krepusko ĝis sunmalleviĝo, sed havas regulitan labortempon. Ilia vivnivelo alproksimiĝis al tiu de urbanoj, estiĝis modernaj vilaĝoj kun evoluinta kultura vivo. La kooperativanoj kvalifikiĝis kaj kleriĝis. Ili estas memkonsciaj homoj. — En la pasintaj 18 jaroj ankaŭ ĉe la cititaj aliaj kooperativmembroj kaj ĉiuj aliaj civitanoj de nia ŝtato grave altiĝis la vivnivelo.

La nuna konstitucio fiksis la rajton kaj devon de la civitanoj je kunlaboro ĉe la solvo de ŝtataj taskoj. Evoluis multflankaj formoj de kunlaboro en la plej diversaj sferoj. Ĉe la Unuiĝintaj popolpropraj uzinoj ekzistas sociaj konsilantaroj, ĉe uzinoj produkcikomitatoj ktp. En la agrikulturo estiĝis kooperativaj konsilantaroj.

Ankaŭ ĉe la jurapliko depost 1949 vasta kunagado de la civitanoj ĉiam pli evoluis. Jam de post 1953 ekzistas t. n. konfliktkomisionoj.

Unue ili pritraktis nur malgrandajn laborkonfliktojn, sed de post kelkaj jaroj ankaŭ bagatelajn krimojn. En la loĝregionoj la arbitraciaj komisionoj de post kelkaj jaroj havas la samajn taskojn. Domkomunumoj en parto de la domoj evoluis kaj jam ludas gravan rolon.

La ŝtata strukturo ankaŭ ŝanĝiĝis. Ne plu ekzistas apartaj landoj kiel Saksio, Turingio ktp. Jam 1952 distriktoj kaj subdistriktoj sendepende de la iamaj landaj limoj estis kreitaj. Ne plu ekzistas izola ŝtata prezidanto de post la morto de Wilhelm Pieck, sed ŝtata konsilantaro. Walter Ulbricht estas ties prezidanto.

Nova konstitucio ne nur devas respeguli nian nunan evolustaton, sed fiksi akirendajn direktivojn kaj helpi pluan fortikiĝon de ekonomio kaj agrikulturo. La lastaj kaŭzos konstantan plibonigon de nia vivnivelo. Alta klerig- kaj kulturstato de niaj civitanoj estas celataj kaj devas esti fiksataj en la nova konstitucio, krome ankoraŭ pli ampleksa kunagado de ĉiuj civitanoj ĉe solvo de ŝtataj taskoj.

Jam ĉe la novjara parolado Walter Ulbricht povis konstati, ke la laboro por la nova konstitucio progresas (intertempe la projekto ĉe ni estas diskutata) kaj ke ĝi estos fundamenta leĝo por germana politiko de paco, demokratio, socialismo kaj popolamikeco. La Unuiĝintaj Nacioj deklaris la jaron 1968 kiel „Jaron de Homaj Rajtoj", bazante sur la solene publikigita deklaracio de la homrajtoj el la jaro 1948 de la 3a asembleo de UN. Tiu deklaracio fiksas, ke ĉiuj homoj sendepende de raso, sekso, lingvo, religio, politika konvinko, nacia aŭ socia deveno, posedo de propraĵo kaj naskiĝcirkonstancoj estas samrajtaj. En 27 apartaj paragrafoj tiuj rajtoj estas detaligitaj, inter ili la rajto je laboro, klerigado, demokrata kunagado kaj ŝirmado de la persona libereco kontraŭ arbitreco.

Tiuj homrajtoj, plivastigitaj de la 21a asembleo de UN kiel konvencio de homrajtoj, en 1968 devas esti ĉefa tasko por la laboro de UN. Tiurilate multo estas farenda. Ni nur pensu pri la Usona agreso en Vjetnamio kaj la agreso de Israelo sur araba teritorio kaj pri la kruela persekutado kaj torturado de progresemaj homoj kiel ekzemple Theodorakis per la faŝisma reĝimo en Grekio. En Sudafriko ankoraŭ validas kruelaj rasleĝoj, en Usono negroj pro sia haŭtkoloro estas traktataj kiel duarangaj homoj. Citinde estas, ke tiaj agoj okazas per ŝtatoj, kiuj 1948 kundecidis la deklaracion pri homrajtoj aŭ, kiel Israelo, ĉe la aliĝo agnoskis.

Nia kontribuo al la „Jaro de Homaj Rajtoj" estu nia nova socialisma konstitucio, bazanta sur la plej alta homrajto, defendo de la paco!

Verkis: Elsa Gruhle, Leipzig

Arbeitsgruppe Esperanto Karl-Marx-Stadt 2. Februar 1968

Erklärung

Der zur Diskussion vorgelegte Verfassungsentwurf war uns Anlaß, eine Aussprache über den Inhalt dieser ersten sozialistischen Verfassung Deutschlands zu führen.

Wir sind der Meinung, daß in diesem Verfassungsentwurf sehr deutlich die Verwirklichung der Volkssouveränität in der D D R zum Ausdruck kommt. Der vor ca. 10 Jahren geborene Grundsatz: „Arbeite mit, plane mit, regiere mit" enthält ein ganzes Programm für die Entwicklung der sozialistischen Demokratie in der DDR. Unsere neue Verfassung zeigt, welch hohen Grad der mit diesem Grundsatz begonnene Entwicklungsweg erreicht hat. In unserem sozialistischen Staat deutscher Nation wird uns keine fertige Verfassung vorgelegt. Bei uns bestimmt der Staatsbürger eines sozialistischen Staatsvolkes, wie es in unserem Haus aussehen soll. Wir als Bürger der Deutschen Demokratischen Republik verwahren uns gegen alle verleumderischen Behauptungen der westdeutschen Propaganda, die unsere sozialistische Heimat verunglimpfen.

Wir Esperantofreunde verpflichten uns, den humanistischen Gehalt unserer neuen sozialistischen Verfassung unseren Esperantofreunden in aller Welt zu erläutern und zu übermitteln.

Arbeitsgruppe Esperanto im Deutschen Kulturbund
Karl-Marx-Stadt

Unterschriften:

Else Müller, Verkäuferin
Willi Weißbach, Angestellt.
Herbert Rothe, Schlosser
Alfr. Müller, Büchereileiter
Ruth Ehrlich, Kindergärtn.
Martin Emmrich, Eisenbahner
Alfred Ehrlich, Maler
Wilfried Hofmann, Konstrukteur
Rolf Bethke, Student
Harri Dost, Bau-Ing.
Herta Roth, Angestellte
Gerhard Rauh, Sachbearb.
William Sp.eker, Heizer
Paul Richter, Rentner
Lore Knapp, Kindergärtn.
Fritz Neuhaus, Schlosser
E. Neuhaus, Hausfrau
D. Dietrich, Apotheker
Johanna Weiske, Buchhalt.
Petra Helmert, Studentin
Werner Polster, Rentner
Dr. H. Lange, Betriebsleiter
Willi Tittmann, Elektriker
Erich Meusel, Dreher
Walter Gohla, Bildreporter
R. Burmeister, Zimmermann
E. Burmeister, Sekretärin
Dieter Heimann, Kochlehrl.

Rudolf Burmeister, 1. Vorsitzender

Esperantistoj el Werdau por nova socialisma konstitucio

Kontraste al la ŝajndemokratio en GFR, kie la „demokratia konstitucio" paŝo post paŝo estas malkonstruata per la „Leĝoj por kriza stato" (Notstandsgesetze) kaj kie preparîgas militista diktaturo, ni salutas la veran demokration en GDR, kiu esprimiĝas per ĉiam pli larĝa rajto je kunregado en la ŝtatoj kaj ekonomiaj sferoj. Pro tio ni subtenas la novan socialisman konstitucion.

La respondecan pozicion, kiu enhavas nia respubliko meze de Eŭropo, por paco kaj popolamikeco, devas esti akcentata pli forte en la konstitucio. Kontraŭe al la militpreparoj de la okcidentgermana imperiismo nia ŝtato pli kaj pli evoluas al firma bastiono de la paco kaj socialismo.

Al ĉio ĉi respondas la nova konstitucio de nia socialisma ŝtato kaj tial ni varme salutas ĝin.

Esp.-grupo „Popolamikeco"
Werdau

La ĝusta sinteno de Esperantisto

En la informilo de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato „SPRAVY“, n-ro 2–3, oktobro 1967, paĝo 15 aperis salutvortoj de Tomaŝ Balda, kiujn li direktis al junularkonferenco. Ĉar lia salutparolo enhavas principojn, kiuj estas gravaj ankaŭ por nia laboro, ni represas parton de ĝi:

„Ĉi-okaze mi volas turni vian atenton al kelkaj principoj, havantaj decidan influon al la rezultoj de nia laboro:

Iuj el niaj esperantistoj ne ĉiam klare konscias kiamaniere direkti sian laboron, por ke ĝi estu kiel eble plej efika kaj respondu al la postuloj, kiujn antaŭ nin metas la socio de nia lando kaj la evoluŝtupo, sur kiu troviĝas la Esperantomovado en la nuna tempo.

Ni sincere deziras, ke nia afero sukcesu, tial ni devas ligi ĝin pli ol ĝis nun al la progresemaj ideoj de la nuntempo — al la progresivaj fluoj, kiuj batalas kontraŭ ĉio, kio bremsas la vojon antaŭen, kondukas al militoj kaj kaŭzas malamikecon kaj malpacon inter la homoj kaj nacioj.

Ni esperantistoj, kiel homoj progresemaj, povas — helpe de nia lingvo — grave kontribui al la kreado de internacia amikeco kaj paco. Sed ni ĉiam konsciu, ke la lingvo mem ne estas la unusola universala rimedo, per kiu ni interamikigos la homojn. Ni devas lerni vidi, kie estas la faktaj kialoj de malkonkordoj kaj malpaco: ili ja troviĝas ne n u r en la lingva diverseco, sed sur sociaj, klasaj, ideologiaj kaj mondkoncepta j kampoj. Centmilionoj da homoj en la mondo ja parolas unu lingvon (la anglan, araban, hispanan, francan) kaj malgraŭ tio ili vivas en malpaco.

Tamen Esperanto enhavas apartan spiriton, kiu altiris plejparte noblajn kaj pacamajn homojn, kiuj aspiras veran amikecon kaj kunlaboron. Esperantistoj — la veraj — estas humanistoj, kontraŭstarantaj al ĉiu ajn ekspluatado kaj subpremado. Ili estas kontraŭ agresa kaj humiliga milito, furiozanta en kelkaj partoj de nia terglobo — precipe en Vjetnamio. La aktualaj taskoj, kiuj staras antaŭ niaj celkonsciaj esperantistoj estas: krei fortikan fronton de Esperantomovadoj en progresemaj landoj; ligi amikajn rilatojn kun progresemaj organizaĵoj kaj unuopuloj en aliaj landoj de la mondo; gajni ĉiujn junajn esperantistojn por kunlaboro en ĉiuspecaj aktivadoj, kiuj kongruas kun la aspiroj de la junularo. Ĝuste en tiaj agadoj manifestiĝas la principoj kaj celoj de Esperantomovado; en ili manifestiĝas ties forto kaj sekve la fina venko.

Iuj niaj samideanoj, volante prosperigi nian aferon, aktivas nur en la kadro de Esperanto-movado kaj izoliĝas disde la laboroj en aliaj sferoj de nia socia vivo. Ekz. ili evitas la anecon en sociaj organizaĵoj, naciaj komitatoj, sindikatoj, en Kompartio ktp. Tian sintenon ni konsideras erara. Ĝuste tie oni havas la okazon veki interesiĝon pri Esperanto kaj konfidon al ties celo kaj misio. Estas ja tute logike, ke ĝuste en la sino de la socio; ĉie, kie kunvenas homoj, povas serioza kaj celkonscia esperantisto per sia modela sinteno kaj laborkapableco atingi renomon kaj komprenon por Esperanto. Ni devas tion fari ne nur en intereso de Esperanto mem, sed ankaŭ pro nia civitana devo. Ni ja devas konsciiĝi, ke oni ne rajtas arogi al si kompetentecon konstrui novan, pli bonan kaj justan eksteran mondon, se ni ne partoprenas unualoke la konstruadon de nia propra feliĉa hejmo — de nia socialisma patrio. Ĝuste en tio manifestiĝas la majesta ideo de Esperanto, nome la ideo de internaciismo kaj patriotismo, kiu trapenetrita de la vera Zamenhofa

humanismo nepre kondukos la mondon al paco kaj frateco.

El vidpunkto de la evoluo de la homa socio, Esperanto staras hodiaŭ nur sur la unua ŝtupo. Kaj tial ĝi bezonas aktivajn adeptojn, pretajn dediĉi al ĝi siajn fortojn kaj tempon. Vera esperantisto ne estas tiu, kiu ellernis Esperanton kaj uzas ĝin nur por siaj propraj, individuaj bezonoj kaj interesoj, male: vera esperantisto estas flama heroldo kaj batalanto por ĉiuj tiuj ĉi sublimaj celoj. Li estas senskua komunikanto de la plej progresemaj ideoj de la homaro, interpretante ilin per la unika universala lingvo — Esperanto."

Kara Esperanto-amiko, bonvolu trastudi bone tiujn ĉi salutvortojn de nia ĉeĥoslovaka pacamiko Tomáš Balda, pripensu ĉion kaj diskutu ĝin kun viaj geamikoj kaj gesamideanoj. Konkludu kaj agu! Tiam la estonteco estos nia.

Rudi Graetz,
Prezidanto de CLR.

Esperanto en tekniko -

Grava tasko de la internacia Esperanto movado

Dum 51a Universala Kongreso de Esperanto 1966 en Budapeŝto oni fondis la internacian „Teknikan Ligon" (TL de ISAE), kiu elektis Internacian-Sciencan-Asocion-Esperantistan (ISAE) kiel ĝeneralan bazo-organizaĵon. ISAE subtenas kaj helpas la ekzistadon de la Teknika Ligo, kaj tamen TL de ISAE sendepende povas agadi kaj labori sur siaj terenoj de la tekniko laŭ la statuto de TL de ISAE.

TL de ISAE volas ekz. plenumi sekvajn taskojn: kreadon de specialaj kaj necesaj fak-terminoj; — eldonadon de teknika Esperanto-revuo kaj fakliteraturo; — internaciajn renkontiĝojn de geteknikuloj; — ekskursojn fakajn al interesaj produktejoj por interŝanĝi fak-spertojn.

Nuntempe jam ekzistas kelkaj Teknikaj Komisionoj en la kadroj de la Landaj Esperanto-Asocioj.

Estas intencate ankaŭ fondi Teknikan Komisionon en la kadro de Centra Laborrondo de Esperanto amikoj de la GDR.

Ĉiu Esperantisto kun teknika aŭ kemi-industria profesio kaj aliaj kunlaboremuloj turnu sin al Gottfried Hofmann, 9031 Karl-Marx-Stadt, Postfach 2..

Zeitschriften-Bezug

Das sowjetische Buch, 108 Berlin, Unter den Linden 17, nimmt für folgende Esperanto-Zeitschriften Bestellungen entgegen:

„Nuntempa Bulgario"		
Jahresabonnement (12 Exemplare)	M	12,—
„Hungara Vivo"		
Jahresabonnement (4 Exemplare)	M	8,80
„Homo kaj kosmo" — Revuo		
Jahresabonnement (4 Exemplare)	M	9,60
„Pola Esperantisto"		
Jahresabonnement	M	4,20

(Die Preise verstehen sich ausschließlich Porto)

Vizito de Albrechtsburg

(Germana kastelo)



Portreto en sablo̧tono

„Pri la personeco de la majstro kaj pri lia deveno ni estas malmulte informitaj“. Sobra frazo sur muzea tabulo, kiu estas dediĉita al la fama arkitekto de la mezepoko Arnold von Westfalen (Arnold la vestfaliano). Kulmina punkto de lia kreema vivo la Albrehta kastelo en Meißen. Nur dum 12 jaroj de 1471 ĝis 1483, estiĝis la impona residejo por princoj. — Grava ekzemplo por la ŝanĝo de konstruado, en tiu tempo, de fortikaĵo al kastelo.

Pri lia deveno ni malmulte estas informitaj. Kaj pri lia personeco? Li devis esti amanta la lumon, la helecon. Antaŭ li neniu alia konstruis la fenestrojn tiel altaj kaj larĝaj. Li ne povis esti estinta malliberala kaj timema. Li kreis la de si mem verkitajn ejojn eksterordinare rigoraj, klaraj, sen ornamaĵoj, li ne bezonis tion por plaĉi. La plafonoj volbiĝas en dinamika vervo, ornamitaj per sablo̧tonaj ripoj. Li devis esti informita pri la efekto de lumo apud malhelo en la arkitekturo, kaj sentime uzis ĝin. Poezio en ŝtono. Ankaŭ pri la majstra memkonfideco informas la ŝtono, pri novaj pensoj. La mezepoko ŝanĝiĝis al novepoko; la homo ekkonis sian forton. La Albrechtsburg, laŭ la arkitekturo kaj unuopaj distingaĵoj malfrugotika, aludas jam per la loĝlokoj kaj malpedanteco (ekz. de la fenestroj) la renesancan palacon. Konstruita kiel loĝkastelo por la regintaj princoj Ernst kaj Albrecht la kastelo konstruaĵo de la vestfaliano Arnold estis malplena kaj dezerta.

Kiel agrabla estas la silento. La vizitanto, en profunda rigardo, ne bezonas buŝan klariganton. Pli multa plezuro premisas konon, tial la vizitanto antaŭ la rondiro estas informata per lumbildprelego. La

vizitanto estas gvidata en ĝi pripensi la historiajn interrilatojn, estas incitita plue mem esplori, estas atentigata pri la specialaĵoj, kaj nun ne preteriras ĉe la valoraĵoj kiel la artoplena katedro en la baroksalono, la ĉiam novaj varioj de la formitaj ripoj sub la plafono; nenie unu el ili similas al alia. Kian fantazion devis esti havinta la vestfaliano...

La monumenta domo estas malnova. Ĝin protekti kontraŭ ruiniĝo bezonas penon, tempon, kostojn. La jam antaŭ jaroj komencita ampleksa restaŭrigo estos finita ĝis la 500-jara jubileo de la kastelo. Kia atentema laboro malantaŭ novaj fasadoj kaj muzee aranĝitaj ejoj, la fremdulo eble nur povas diveni. La 3-a kaj lasta etaĝo nun estas preparata: Ĝi estu dediĉata al la Meißen-a landhistorio kaj al la konstruhistorio de la kastelo mem. La konstruaĵo de Arnold de vestfalio famiĝis en la 18-a ĵarcento, pro nova, speciala okazintaĵo. Böttger ĉi tie eltrovis la procedaĵon por la porcelanproduktigo. Pro Augusto, la Forta (saksa reĝo) la festaj salonoj ŝanĝiĝis al la unua eŭropa porcelanmanufakturo. Dum 150 jaroj la kastelo estis produktejo por la altvalora blanka oro, kies simbolo estas la krucigitaj glavoj.

La 19-a jarcento la arkitekton evidente malbone komprenis. Multnombro de historiaj murpentraĵoj pompe kovras parte la rigoran belecon de la arto, verkita de Arnold la vestfaliano. Li amis la homojn, kiel aliel li povis verki valoraĵojn por la homoj? 150 000 personoj ĉiujare vizitas la konstruaĵon. Junaj homoj, Meißen — promenantoj, artspertuloj, artokonkerantoj ankaŭ lernejoj klasamase; scivoleme, sciante kaj ĝoje, per sia vizito lin kaj lian verkon honoras.

Pri la deveno de la majstro ni estas malmulte informitaj. En perfekta konstruaĵo formita sablo-ŝtono, malnovaj hakitaj ŝtonblokoj, kolonoj, arkoj, rakontas al ni pri lia personeco.

El „Für Dich" 1/68
Trad.: Bernd Weber

Freunde

Kürzlich nahm ich mit meiner Frau an einem Esperantistentreffen in Vilnjus teil. Wir kamen dort mit Menschen aus verschiedenen Städten der Sowjetunion, aus Polen, Ungarn, Jugoslawien und Bulgarien zusammen. Die Atmosphäre war überaus herzlich. Während der Veranstaltungen wurde ich gebeten, Grüße und kleine Geschenke an einige Esperantofreunde in der DDR zu überbringen.

Ein russisches Sprichwort heißt sinngemäß: „Besser als 100 Rubel sind 100 Freunde". Als ich diese Worte zur Erinnerung in das Buch eines neuen Freundes aus Rostow am Don schrieb, erwiderte er: „Habe nicht 100, sondern 1000 Rubel". Rudolf Goebel, Tharandt

Statistikoj de U. N.

Inter 1960 kaj 1965 la monda loĝantaro kreskis de 3005 milionoj ĝis 3295 milionoj. La jara kresko estis plej malgranda en Eŭropo: 0,9 % poste (iom mirige) en Orienta Azio (1,4 %), poste en Norda Ameriko kaj Soveta Unio (ambaŭ 1,5 %). La plej rapida kresko montriĝis en Suda Ameriko (2,8 %), Suda Azio (2,5 %) kaj Afriko (2,3 %).

(Laŭ Informa Servo de UEA)

Oni klare vidas, kiam oni povas antaŭ vidi la finon antaŭ la komenco kaj la celon antaŭ la vojo.

Araba maksimo 7a jarcento

Araba gastamo

La araba gastamo estas bone konata. La prezidanto de la Centra Laborrondo de la Esperanto-amikoj de GDR, Rudi Graetz, antaŭ nelonge havis la eblecon sperti ĝin en Bagdad, kiam li estis gasto de la pacamiko Husen Mohamed Al-Amili kaj ties familio. S-rino Leila Al-Amili brodis Esperanto-flagon kun la literoj M. E. M. por la pacamaj Esperanto-amikoj de GDR, s-ro H. M. Almili tradukis poemon de Johannes R. Becher „La ŝtato" esperanten, la knabino kaj la du knaboj kantis sur sonbendo, kiun li preparis por la Esperanto-amikoj en GDR.

Dum klubvespero en novembro 1967 en Berlin la prezidanto de CLR prelegis pri la arabaj landoj kaj la israela problemo. Li montris lumbildojn pri la Suria Araba Respubliko, pri Irako kaj pri la familio Al-Amili, aŭdigis sonbendon kun la voĉoj kaj kantoj de la familianoj kaj araba muziko, laŭtlegis la poemon „La ŝtato" kaj transdonis sub granda aplaŭdo la „MEM-flagon" kiel araban donacon al la Esperanto-amikoj en Berlin. Ili ĝojis pri la klara Esperanto-salutparolado de la pacamiko Al-Amili, el kiu ni publikigas la jenan parton:

„Tre estimata s-ro Graetz, por mi kaj mia familio, mi elkore bonvenigas vin, kara GDRa samideano, okaze de via vizito al nia urbo Bagdado, la ĉefurbo de nia lando, Irak.

Mi profitas ĉi tiun feliĉan okazon por certigi al vi, ke en nia lando estas sincera amikaro de la pacema progresema lando de la Germana Demokratia Respubliko. Via amikaro ĉi tie tutsincere kredas, ke la genion de la germana popolo ne pruvas la nuntempa politiko de la okcident-germanaj imperiistoj. Tiun genion de la germana popolo sole pruvas la kreanta socia, ekonomia kaj internacia politiko de la granda germana ŝtato-de la GDR. Ĉiuj vere sinceraj germanoj, ankaŭ la veraj amikoj de la germana popolo — ĉiuj deziras al via lando, al la pacema politiko de la Germana Demokratia Respubliko eternajn sukcesojn, plimulte da progreso kaj prospero al via laborema, kulturita pacema popolo — ankaŭ pacon kaj progreson al la tuta germana popolo.

Vivu
la Germana Demokratia
Respubliko!

Vivu
la Araba-Germana Amikeco!

Vivu
nia kara lingvo: Esperanto!

As-Salamu Alejkum!
Paco estu sur vi,
kara germana amiko!"

Kaj jen la poemo, tradukita de nia amiko Al-Amili, Bagdad:

La ŝtato

De Johannes R. Becher

Ŝtato, kiu naskiĝis el la suferado de l'Popol';
Starigis ĝin la Popolo por ŝirmi sin mem;
Ŝtato, kie unuiĝas la regado kun la pensad'
Estas la plej kara ambicio de l'Popol';

Ŝtato, kiu farigis el si mem potencon,
Volanta pacon kaj povas estigi ĝin;
Ŝtato celanta la bonfarton de ĉiuj,
Spaco malfermita por ĉiu homo:
Por fari grandan faron;

Tia Ŝtato meritas la plej grandan honoron,
Ŝtato, kiun la Popolo per la kor' elektas,
Ĉar tia Ŝtato servas al ĝi, per konsil' kaj la far';

Ŝtato tiel amata kaj honorigata
Estas nia Ŝtato, kaj tiu Ŝtato estas Ni:
La Regno de Homo kaj la Homo Ŝtat'.

Terminar-Komisiono

Auf Anregung des Zentralen Arbeitskreises hat sich eine Arbeitsgruppe gebildet, die sich die Aufgabe stellt, Klarheit zu schaffen bei der Übersetzung besonders neuer moderner Ausdrücke, die meist noch nicht in Wörterbüchern zu finden sind. Es ist beabsichtigt, die Ergebnisse der Kommissionsarbeit sukzessive im „der esperantist" zu veröffentlichen. Dabei strebt die Gruppe an, zu dieser interessanten Arbeit möglichst viele erfahrene Sprachfreunde zu gewinnen. Der Anfang wurde gemacht durch ein Schreiben der Arbeitsgruppe an einige „spertuloj" mit der Bitte, Übersetzungsvorschläge für bestimmte Termini zu machen. Die Arbeitsgruppe dankt auf diesem Wege allen, die dieser Bitte entsprochen haben und durch ihre guten Ratschläge der Kommission die Arbeit erleichtern.

Die Terminar-Komisiono bittet weitere linguistisch interessierte Sprachfreunde um ihre Mitarbeit. Außerdem ist die Kommission gern bereit, Fragen auf diesem Gebiet zu beantworten. Bereitschaftserklärung zur Mitarbeit sowie Fragen sind zu richten an

Zentraler Arbeitskreis
der Esperantofreunde der
DDR im Deutschen Kulturbund
Terminar-Komisiono
108 Berlin, Charlottenstraße 60

Bemerkungen zur Aussprache - insbesondere der Vokale (1)

Häufig kommt es zu Diskussionen über die richtige Aussprache. Meinungsverschiedenheiten können dabei eigentlich nur die Vokale betreffen. Bei den Konsonanten herrscht theoretische Einmütigkeit – praktisch hört man desto mehr Verstöße.

Die Grundfrage ist, wie weit man die Aussprache normieren soll. Kann man des Guten zu viel tun?

Richtige Aussprache dient richtigem Verständnis. Erste Voraussetzung ist die Vermeidung von Verwechslungen. Im Wortbestand des Esperanto gibt es viele ähnlichklingende Wörter, die sich nur durch einen Laut unterscheiden: horo – ĥoro – koro, sumo – zumo. Besonders bei p–b, d–t, g–k, s–z, ŝ–ĵ–ĉ–ĝ ist einwandfreie Artikulation notwendig. Oft wird bei uns das r zu schwach gesprochen; „dormo" klingt wie „domo". (Das Esperanto-r ist ein Zungenspitzen-r!)

Bei Vokalen besteht Verwechslungsgefahr nur, wenn sie dialektmäßig unrein gesprochen werden; z. B. a wie o, manchmal bei Ausländern unbetontes o wie a.

An zweiter Stelle steht die Forderung nach Vertrautheit. Ungewöhnliche Aussprache erschwert selbst dort, wo keine Verwechslungsgefahr besteht, das Verständnis. Deshalb sind einheitliche Regelungen der Länge (bzw. Kürze) und Offenheit (bzw. Geschlossenheit) von Vokalen am Platze.

Drittens gibt es ästhetische Forderungen. Sie betreffen besonders die gehobene Sprache (des Redners oder Schauspielers). Die Forderungen sollten aber auch für den weniger anspruchsvollen Sprachverkehr mindestens so weit gehen, daß unterschiedliche Zeichen unterschiedlich ausgesprochen werden – auch wo keine Verwechslungen möglich sind. „Baco" statt „paco", „zed" statt „sed" klingt sehr unschön. Hierher gehört auch fehlerhafte Betonung. Solchen Fehlern muß von Anfang an streng entgegengetreten werden; fehlerhafte Gewohnheiten können später kaum noch korrigiert werden. Dagegen ist eine übertriebene Befolgung des Prinzips, jedes Zeichen in jedem Falle völlig gleich auszusprechen, nicht ratsam. Das führt zu Künsteleien und Erschwerungen und ist in letzter Konsequenz unmöglich. In jeder Sprache werden die Phoneme durch die Nachbarlaute beeinflußt. Ein bekanntes Beispiel ist die Nasalierung des n vor k, die man in den meisten Sprachen findet. Sie sollte auch im Esperanto nicht unterbleiben. Man beachte, daß auch andere Phoneme solche Unterschiede zeigen; vgl. k (g) vor i und o (Kilo – Kohle, gießen – Gosse) oder die Vokale, bei denen zwischen offener und geschlossener Aussprache nicht ausdrücklich unterschieden wird (Bahn – Bank, Kino – Kind, Huhn – Hund).

Eine gewisse Dialektfärbung zeigt meist auch die hochdeutsche Aussprache der Gebildeten. Mecklenburger sprechen anders als Bayern oder Sachsen, auch wenn sie nicht Dialekt sprechen. Feine Unterschiede dieser Art verleihen der Sprache Farbe und Wärme, ihre Aufhebung wäre eher ein Verlust als ein Gewinn. Im Esperanto ist diese Eigenart auf eine höhere Stufe gehoben, es gibt hier der Aussprache nach einen englischen, einen französischen usw. Dialekt. Man vergeude keine Energie gegen Unvermeidliches, sondern werte es als Bereicherung. Schließlich hat jeder Mensch seine eigene Aussprache und Diktion, wie könnte man ihn sonst an der Stimme erkennen? Die Übergänge zum Dialekt sind fließend. Wer aber wollte anstreben, daß alle ununterscheidbar sprechen wollen?

Dr. P. W. Ruff

Atenton!

Karaj legantoj,

vivanta lingvo kapablas esprimi ĉiujn nuancojn de la homa spirito. Tion ni – la esperantanoj – ofte kaj persvade opinias pri la Internacia lingvo „Esperanto".

Lingvo estas komplika instrumento, kies regadon oni devas pene akiri. Por stimuli la ĉiuflankan strebadon al perfektiĝo, ni proponas al ĉiuj esperantanoj partopreni en nia ĉi suba

Lingvo - konkurso

La tasko estas du konkursaj tradukoj – esperantigo de jenaj du tekstoj:

1. La enkonduko de nia nova konstitucio, trovebla sur titola folio de ĉitiu numero

2. „Der überlegenen Schnelligkeit vermochte Chiles Meister nichts Entscheidendes entgegenzusetzen. Da auch die DDR-Abwehr den anfänglich so kreuzgefährlichen, quicklebendigen Angriff des Gastgebers zusehends besser unter Kontrolle bekam (Körner meldete den gefürchteten L. Sanchez derart ab, daß er schließlich ausgewechselt werden mußte), ging die mit so viel Hoffnung aufs Spielfeld gelaufene Studentenmannschaft nach und nach gänzlich unter. Nur der überaus schnelle Araya entwischte dem Hallenser Bransch noch gelegentlich und sorgte für einige Unruhe vor dem Gehäuse von Blochwitz."

La premioj por la gajnontoj estas:

1. **Prus: „La Faraono" 3 volumoj**
2. **Sánta: „Dudek horoj"**
3. **Mádách: „La tragedio de l'homo"**

kaj dek pluaj laŭdpremioj.

Pri la plej bonaj kontribuoj decidos gremio el spertaj kaj kapablaj esperantanoj, kies konsiston ni publikigos en la sekva numero.

La lasta akcepttago por viaj kontribuaĵoj, sendota al Centra Laborrondo, 108 Berlin, Charlottenstraße 60, estas la 15. Majo 1968 (dato de la poŝtstampo).

Kaj nun ni alvokas ĉiujn: Amase partoprenu!!

Koncernas niajn kursgvidantojn

Kiel ni jam raportis en „der esperantist“ Nr. 18/19 la verkinto de nia nova lernolibro „Wir lernen Esperanto sprechen“, Ludwig Schödl, donis enkondukon dum seminario en Novembro 1967. Ĉi sube ni publikas parton de la referaĵo:

La nova lernolibro nun estas havebla en la librejoj kaj certe ĉie, kie en nia respubliko ekzistas E-grupo ankaŭ komenciĝis kurso aŭ kursoj, kiuj uzas ĝin.

La lernolibro same konvenas por memstudo kiel por kursoj.

Mi rekomendas al la kursgvidantoj, gvidi la kursojn ĉefe laŭ la rekta metodo. Parolu do al viaj gelernantoj rekte en E sen antaŭaj klarigoj. Se vi lasas gvidi vin de la libro, tiam vi tuj povas komenci per frazoj, kiujn komprenas la gelernantoj ankaŭ sen antaŭaj scioj, sed kiuj tamen instruas al ili valorajn vortojn kaj gramatikajn erojn. Vortoj, kiuj ne senpere estas kompreneblaj devas esti klarigataj per objektoj, bildoj, gestoj k. s. Tio ĝenerale ne eblis en la libro, ĉar la amplekso de la libro kaj la eblaj ilustraĵoj dekomence estis forte limigitaj. Se do ekzemple en la libro la vorto 'ĉevalo' estas donita kun la koresponda germana vorto, tiam en kurso la gvidanto enkondukas 'ĉevalo'n, montrante figuron aŭ bildon. Se vi montras al viaj gelernantoj skatolojn kun kaj sen alumetoj, paperoj kun kaj sen truoj, kovertojn kun kaj sen poŝtmarkoj, kaj diras tion en E-tiam viaj gelernantoj komprenas kaj lernas la nociojn 'kun' kaj 'sen' sen la koncernaj germanaj vortoj. La objektoj kaj bildoj estu amuzaj, la gestoj de la instruanto ne timemaj, sed alikaze ne troigaj, por ke la kurso ne fariĝu amuza cirko sen serioza studado.

Ekzistas diversaj homaj tipoj ankaŭ rilate al lernado. Iuj scias ripeti aŭditajn vortojn kaj frazojn kvazaŭ papagoj, kaj ili eĉ memoras ilin. Aliaj nur lernas vorton, vidinte kaj skribinte ĝin. Aliaj memoras la nociojn 'acida', 'amara', 'dolĉa' ktp, se ili fakte gustumis tiajn fruktojn kaj bone memoras 'glata', palpinte glatan surfacon.

Estas tre rekomendinde, doni novajn vortojn en certaj koneksoj. Ekzemple 'acida citrono', 'maturaj fruktoj', 'fidela hundo', 'urbego Moskvo'.

Se la klarigo de nocio per la rekta metodo estus tro temporaba aŭ lasus dubojn pri la ekzakta kompreno, tiam ne estu pedantulo, sed simple donu la germanan klarigon!

Mi rekomendas, ĉiam lasi resumi la nove akiritajn sciojn ankaŭ germane. Ekzistas multaj homoj, kiuj nur tiam plene komprenas ilin.

Ne forgesu labori kun la modestaj, silentemaj kaj timemaj kursanoj. Laŭdu kaj kuraĝigu ilin!

Komencu ĉiun lecionon per ripetado de la antaŭaj! Uzu diversajn metodojn! — Konversacio inter vi kaj la gelernantoj. La gelernantoj demandu sin reciproke laŭ donita modelo. La kursanoj mallonge parolu pri certa temo. La kursanoj priskribu bildon. Vi certe havas valizeton, en kiu troviĝas viaj demonstraciaj objektoj kaj bildoj. Foje lernanto elpaku ilin, parolante pri ĉiu unuopa objekto. Ne tro longe, alia lernanto daŭrigu! Ordonu al viaj gelernantoj ... Levu la dekstran manon! Rigardu supren! Prenu krajonon! Malfermu vian kajeron! Fermu ĝin! Demandu: „Kiu estas s-ro X?“ (Ĉu li tuj vokas: „Jen, mi!“, kaj la aliaj montrante lin: „Li estas s-ro X!“?)

Nu, mi ne bezonas instigi vin, muziki kaj kanti kun la kursanoj, se vi kapablas fari tion. En la libro la unua kanto aperas en la 9-a leciono. Estas bone, ke la kursanoj ankaŭ bone komprenu, kion ili kantas. Se vi scias pli simplajn kantojn, kiuj permesas kanti pli frue, ne hezitu, fari tion! Tre utila estas la uzado de sonbendoj. La gelernantoj, kiuj deklamas kaj kantas sur sonbendojn, klopodas bone prononci.

Tre atentu, ne uzi en la konversacio gramatikajn erojn antaŭ ol ili estas enkondukitaj. Tio precipe validas rilate al la akuzativo. Nepre ne uzu antaŭ la kvara leciono tranzitivajn verbojn, kiuj ja nepre postulas komplementon en akuzativo! Same evitu ĝis tiam la salutojn!

La facile memorebla gvidilo tra la libro estas la demandoj. Por la 1-a leciono 'kio' kaj 'ĉu', por la 2-a 'kia' kun la pritrakto de la adjektivoj, por la 3-a 'kiu', kiu temas pri personoj, por la 4-a 'kion faras ...?', kiu ĉefe temas pri la akuzativo ...

Per la participoj en la 11-a kaj 12-a lecionoj finiĝas la gravaj gramatikaj eroj. La formo '-anto' jam aperas en la 4-a leciono ĉe la personoj, sed sen difini ĝin kiel participformon, simple kiel sufikson por agantaj personoj. Mi konsilas, ne tro insisti pri tuja perfektiĝo en lerta uzado de ĉiuj participformoj. Sed zorgu, ke viaj gelernantoj tute nature sciu apliki '-ita', la plej necesan kaj plej ofte uzatan formon. En via valizo nepre estu skatolo kun uzitaj alumetoj, uzitaj biletoj, fermita kaj malfermita kovertoj, rompita krajono, bildo kun senŝeligita oranĝo, bindita kaj nebindita libroj, ktp.

Antaŭ ol la kurso finiĝas, ĉiu kursano devus havi la unuan korespondanton. Nenio pli ligas la kursanon al E ol la praktika uzado, nenio ligas lin pli al nia grupo ol la bezono, konsultiĝi pro valora korespondado.

Informu konstante viajn kursanojn pri la novaĵoj el nia movado! Ne forgesu, varbi ilin por la Kulturligo antaŭ la kursofino!

Mi kore deziras al ĉiuj kursgvidantoj ĝojon en la instruado kaj sukcesojn!

L. Schödl

Ĝardenkreskaĵo

La satiro estis la politika glavo de Kurt Tuĥolski (Kurt Tucholsky). Ĉi – sekvanta poemo, skribita de li antaŭ pli ol 30 jaroj, eĉ nuntempe ankoraŭ donas trafan karakterizon de certaj funkciuloj de la Socialdemokratia Partio en Okc. Germanio.

Sinnend geh' ich durch den Garten,
still gedeiht er hinterm Haus;
Suppenkräuter, hundert Arten,
Bauernblumen, bunter Strauß.
Petersilie und Tomaten,
eine Bohnengalerie,
ganz besonders gut geraten
der beliebte Sellerie.
Ja, und hier? –
Ein kleines Wieschen?
Da wächst in der Erde leis
das bescheidene Radieschen;
außen rot und innen weiß.

Meditante mi promenas tra
l'ĝardeno,
trankvile kreskas ĝi ĉe nia dom',
supoherboj, rosmareno,
buntaj floroj, kaj sur arbo
evoluas pom'.
Petroselo kaj tomatoj,
de fazeoloj galeri',
ŝenoprazo ankaŭ, por salatoj,
kaj la ŝatata celeri',
Kaj tie-ĉi? –
Malgranda herbejeto?
En ĝia tero kun kvieto danka
modeste kreskas rafaneto;
ruĝa de ekstere kaj interne blanka.

Sinnend geh' ich durch den Garten
unsrer deutschen Politik;
Suppenkohl in allen Arten
im Kompost der Republik.
Bonzen, Brillen, Gehberockte,
Parlamentsroutinendreh ...
Ja, und hier? –
Die ganz verbockte
liebe gute SPD.
Hermann Müller, Hilferlieschen
blühn so harmlos, doof und leis
wie bescheidene Radieschen:
außen rot und innen weiß.

Meditante mi promenas tra
l'ĝardeno
de germana nia politik';
supoherboj, tuta la tereno,
en la sterkmiksaĵo de la respublik'.
Boncoj, miopuloj, redingotoj,
parlamentrutinaj paroladoj ...
Kaj tie – ĉi? –
Profunde en la burĝaj kotoj
la socialaj demokratoj.
Hermann Müller, Hilferding-rozeto
stultnaive floras ili – oportune
flankaj –
kiel la modesta rafaneto:
ruĝaj de ekstere kaj interne
blankaj.

Trad.: H. R o t h e, Karl-Marx-Stadt

Anmerkung der Redaktion:

Nach einem Hinweis von Bdfrd. Ludwig Schödl teilen wir mit, daß bei der Übersetzung des Liedes von Theodorakis („der esperantist" Nr. 18/19) die erste und dritte Strophe von L. Schödl, die anderen Strophen von R. Burmeister übersetzt wurden.

Telegramo al: MEM

Mondpaca Esperantista Movado
Nikola Aleksiev
P. K. 66
S o f i a

La krimoplena agresmilito de usonaj imperiistoj kaj iliaj lakeoj kreis profundan malamon inter la vjetnamoj popolamasoj. Iliaj subintencoj intensigi kaj vastigi militon en ambaŭ suda kaj norda landopartoj kaj obstinema sintenadon plue senvualiĝis, kiam ili refutis proponon de Sudvjetnama Liberiga Nacifronto ĉesigi pafadon sep tagojn okaze Têtfesto, humana mezuro plenkonforma al sopiroj de sudvjetnama popolo kaj de plejparto el Sajgonaj administracio kaj armeo. Antaŭ tia ŝtato sudvjetnama popolo agorde kun liberigaj armefortoj, unuigante larĝajn popolfortojn naciecajn demokratiajn kaj pacajn, unuanime leviĝis, lanĉis ĝeneralan atakon kontraŭ ŝlosilaj pozicioj de la malamiko sur sudvjetnama teritorio de inkluzive Sajgon, Huê kaj Danang.
Kun altgrada decidemo, defendi legitimajn nacirajtojn kaj pozitive kontribuante al naciliberiga kaj pacdefenda aferoj de tutmonda popolo, la sudvjetnama popolo heroisme batalis kaj gajnis brilajn sukcesojn kaj laŭ venkoplena impeto antaŭenmarŝas al novaj venkoj.

Ni proponas, MEM - Sekretariato kaj MEM-Sekcioj antaŭenpuŝu subtenmovadon al Vjetnamio inter monda esperantistaro, paralele kun novaj cirkonstancoj havu akuratajn agojn stimuli larĝan amasmovadon en diverslandoj kun celo kuraĝigi la novan etapon de sudvjetnama lukto, estigu larĝan movadon kondamni barbarajn US-krimojn bombadi sendistinge, semi morton, ruinojn en Sajgono, Danang kaj multaliaj lokoj, postulu ke ili retiru senprokraste usonajn kaj satelitajn trupojn el Sudvjetnamio, ĉesigi por ĉiam kaj senkondiĉe bombadojn kaj ĉiujn aliajn militagojn kontraŭ Vjetnama Demokratia Respubliko, lasi al vjetnama popolo plenrajton reguli siajn aferojn.

VJETNAMA PACDEFENDA ESPERANTISTA ASOCIO

(Tekto respondas originalon)

Im Kampf geboren

Es erfüllt uns Esperantisten mit Hochachtung, daß unsere vietnamesischen Freunde trotz schwierigster Bedingungen ihre Verlagstätigkeit in Esperanto - Literatur weiter verstärken konnten. Auch in den vergangenen Monaten sind mehrere Bücher in Esperanto erschienen, die meist aus dem unmittelbaren Erleben heraus geschrieben wurden und vom heldenhaften Kampf dieses geprüften Volkes berichten. Diese Werke sind deshalb von hohem aktuellen Wert und deshalb innigst zu empfehlen. Leider haben noch nicht alle Zirkel verstanden, diese im Kampf geborene Literatur in der Zirkelarbeit auszuwerten.
Die Bezirksarbeitskreise halten Esperanto-Literatur aus Vietnam zum Verkauf bereit. Außerdem hat die Karl-Marx-Buchhandlung in Berlin eine große Anzahl Titel in ihrem Esperanto-Angebot.

Jedes verkaufte Buch aus Vietnam dient der Solidarität, denn der Erlös des Verkaufs fließt dem Solidaritätskonto zu.
Übt Solidarität!

Hier die Titel der letzten Monate:

Ho Chi Minh: Kontraŭ la Usona agreso por la nacia savo
Luu Quy Ky: La Vjetnama problemo
Hai Thu: Nord-Vjetnamio kontraŭ la U. S.-aermilito

Subtenu la Mondpacan Esperanto-Movadon (MEM)
Abonu la revuon „PACO".

Mia opinio pri la „Faktoj pri Germanujo"

— kelkaj rimarkoj —

Post R. Schwartz ('Germana Esperanto-Revuo' n-ro 12/1966) kaj Dobrzynski ('Pola Esperantisto' n-ro 2/1967) mi nun kuraĝe entreprenas skribi pri la okcidentgermana broŝuro „Faktoj pri Germanujo", eldonita de la gazetara kaj informa fako de la registaro en Bonn.

Mi nek intencas konkuri kun la du grandaj antaŭrecenzantoj, nek skribi recenzaĵon. Sed: mi havas star-, vid- kaj sentpunkton rilate al tiu ĉi libreto. Almenaŭ tial mi rajtus sukcesespere konkurenci al Schwartz.

Mia amiko R. Dobrzynski trafe recenzas el la vidpunkto de polo. Mi skribas el la vidpunkto de germano. Kaj tamen ne favore al la „Faktoj pri Germanujo"? La aŭtoro de la libro kaj mi estas germanoj, respegulantaj per siaj vortoj kaj agoj la karakterojn de la du germanaj ŝtatoj: Germana Demokratia Respubliko — Germana Federacia Respubliko.

La germana imperiismo komencis la duan mondmiliton, suferigis, bruligis, murdis tra tuta Eŭropo.

Post la 8-a de majo 1945 la popoloj en Eŭropo novordigis sian vivon kaj siajn limojn por esti sekurigitaj ankaŭ dum estonto. Novordo pleje necesis en „Germanio"! La germanaj homoj revis pri paco kaj pano, samtempe promesinte: „Estu fino! Germanio nun finfine paciĝos eterne!"

La komunistoj kaj aliaj demokrataj kaj progresemaj germanoj komencis renovigi, sennaziigi, redemokratiigi. Sed sub la specialaj cirkonstancoj de okupiteco la strebado de la germana popolo nur sukcesis sub la ŝirmo de la progreso en la tiama Sovjeta Zono. Tie oni strečis ĉiujn fortojn por gardi la unuecon de Germanio. Sed la tutmonda imperiismo jam novalianciĝis kun la germanaj imperiistoj por retropuŝi la spiritan kaj faktan influojn de Sovjetunio. Spite al la „Konvencio de Potsdam" ili separatigis „siajn" zonojn kaj per la granda monŝanĝado en la tri okcidentaj zonoj ili ĉesigis la ekzistadon de „Germanio"! Ĝi momente ne ekzistas!

Dum en la Germana Demokratia Respubliko la naziismo kaj ĉiuj ĝiaj bazoj estas forbalaitaj energie, en la Germana Federacia Respubliko la neinstrueblaj revenĝemuloj, militistoj kaj faŝistoj jam novestabliĝis.

Post ĉio ĉi, kion alportis la dua mondmilito al popoloj de Eŭropo kaj al la germana popolo, oni esperis venkon de humaneco kaj saĝeco. Sed sankta ĉielo — ĉu la germana popolo ne hontas, legante ellaboraĵon kiel la „Faktoj pri Germanujo"? En senriproča Esperanto oni nun disvastigas tiujn ideojn, kiuj jam dufoje dum tiu ĉi jarcento instigis al murdado de milionoj da homoj.

Belege desegnitaj landkartoj prezentas multkolore la eksteran politikon de la registaro en Bonn: Tiuj kartoj montras nek Germanan Demokratian Respublikon nek Popolan Respublikon Pollandon.

Ĉu la malrespekto al tiuj du ŝtatoj ne estas esprimo de revenĝemo? Kion alian oni celas per la malrespekto de la 'status quo' en Eŭropo ol ĝian renverson?

Mi ne volas tuŝi aliajn trajtojn de la broŝuro. Ĝi vomige legiĝas, se oni pensas pri la germana pasinteco. Vomigas min la malhonto per kiu oni provas postuli polajn, sovetajn kaj čehajn teritoriojn. Naŭze mi konstatis la fiajn men-

sogojn pri mia ŝtato — pri la Germana Demokratia Respubliko. Timigas min la grandulmaniero per kiu oni simple forgesas rakonti pri nia pasinteco. (Unu frazo pri la naziismo -kaj jam ĝi estas venkita). Kaj ĉio ĉi en nia bela lingvo Esperanto. Ho ve, kion dirus Zamenhof, kiu revis pri egaleco kaj samrajteco inter ĉiuj popoloj?

Kaj cetere: Ĉu la celintenca mensogado pri historiaj faktoj aŭ ties prisilentado ne estas „neneŭtraleco“? Ĉu ne la landkartoj jam sufiĉe pruvas la „neneŭtralecon“ de tiu ĉi Esperantlingvaĵo?

Kaj kiu esperantisto ĝin tradukis? Eble hontante, li ne kuraĝis publikigi sian nomon. Sed la „Germana Esperanto-Asocio“ (okcidenta-) fieras en sia jarraporto 1966/67 pri la tria eldono de la „Faktoj“. La sama GEA, kiu kulpigas nin pro „neneŭtraleco“, fanfarone laŭdas „Faktoj pri Germanujo“. (Eble tamen ne mirinde, se oni scias, ke elstara funkciulo de TEJO iĝis redaktoro de „Okcidentgermana Revuo“). La revenĝema peresperanta agado de GEA cetere ne estas nova. GEA jam helpis ĉe eldono kaj traduko, eĉ lingve aprobis, la „Sciindaĵoj pri la Soveta Zono de Germanujo“ (1960), „Meze en Germanujo“ (1959) k. a.

Kia frenezaĵo uzi Esperanton por postuli teritoriojn de lando, kie naskiĝis la kreinto de Esperanto, kies revo pri suverena pola ŝtato eĉ dum Universalaj Kongresoj de Esperanto estis substrekita.

Kia naiveco postuli de nia esperantistaro en GDR forlasi ĝian starpunkton rilate la Eŭropan 'status quo', ŝajnpruvante per tio la neeblecon de kontaktoj inter esperantistaj organizaĵoj de ambaŭ germanaj ŝtatoj.

Ĝis hodiaŭ mi legis en la (okcident-) „Germana Esperanto-Revuo“ eĉ ne unu vorton kontraŭ la agresado de Usono en Vjetnamio. Sed mi legis la tendencan recenzaĵon de Schwartz, la politikajn absurdaĵojn de s-ro pseŭdonimulo ASO, kaj mi legis la jarraporton de GEA, en kiu la „neneŭtralaj“ esperantistoj en GDR estas kondamnitaj.

La esperantista solidareco por niaj vjetnamiaj gefratoj estas nomita „neneŭtrala“ kaj pro tio „neebla“. La propagando de revenĝemo kaj de malaprobo de fakte ekzistantaj limoj laŭ gusto de GEA estas ŝajne en ordo.

Sankta dio — ĉu vere neniu okcidentgermana esperantisto rimarkas, kion oni ludas en siaj estraroj?

Neniu linio kontraŭ la novfaŝisma evoluo en la Germana Federacia Respubliko — sed multe da esperantlingvaj libroj kaj gazetoj, kiuj postulas renverson de la Eŭropa ordo.

Indulge mi legis la recenzon de Schwartz, ĝoje mi salutis la artikolon de Dobrzynski, sed proteste mi levas la voĉon kontraŭ la malprotesta sinteno de granda parto de la okcidentgermana esperantistaro.

Okcidentgermanaj esperantistoj vekiĝu! Nia lingvo celas fratecon kaj justecon! Ne forgesu pro la luksa fasado de la libro ties enhavon!

Estu pli kritikemaj! En tiu strebado ni certigas vin pri nia subteno.

Hans E i c h h o r n

Fontoj:

1) „Faktoj pri Germanujo“ 3-a eldono
2) GER n-ro 12/1966
3) Pola Esp. n-ro 2/1967
4) „Originala Verkaro de Zamenhof“ eld. 1929 Leipzig
5) GER n-ro 5/1967

Werdau:

Kiel ni preparis la „Ruĝan Oktobron“

Nia Esp.-grupo en Werdau dekoraciis honore al la Granda Socialisma Oktobra Revolucio 3 montro-

fenestrojn en nia urbo kaj po unu en Ronneburg kaj Crimmitschau. Gvidmotivo en ĉiuj vitrinoj estis la unua apelacio de la sovetia ŝtato: „La dekreto pri la paco“. Reproduktaĵoj de pentraĵoj kaj imponaj afiŝoj esperantistaj, pliriĉigis la enhavon. Granda kaj bela sovetia afiŝo ankoraŭ hodiaŭ ornamas la antaŭhalon de la klubejo „Karl Marx“ en Ronneburg.

Potsdam

An der im Rahmen einer zur Bezirksdelegiertenkonferenz des DKB Potsdam veranstalteten Ausstellung haben sich auch die Esperantofreunde des Bezirkes beteiligt. Sie hatten dabei genügend Platz zur Verfügung, um das Wesentliche ihrer Arbeit zu zeigen. Die Ausstellung unserer Freunde fand bei den Delegierten das erhoffte Echo. Den Delegierten wurde außerdem ein Tätigkeitsbericht vorgelegt, aus dem u. a. hervorgeht, daß aktiv arbeitende Kreisarbeitsgruppen in Potsdam, Brandenburg, Klein-Machnow, Neuruppin und Rathenow bestehen, bei denen sich entsprechend ihrer Möglichkeiten bereits Besonderheiten in der Arbeit herausgebildet haben. So gibt es in Potsdam, dem Touristenzentrum des Bezirkes, Führungen in Esperanto (Nationalgedenkstätte Schloß Cecilienhof) und an einem Esperantotext für den Stadtprospekt wird gearbeitet.

Die Esperantofreunde des Bezirkes sehen eine ihrer wichtigsten Aufgaben darin, die Wahrheit über unseren sozialistischen Staat und über die Friedenspolitik unserer Regierung den ausländischen Freunden zu vermitteln. Hierzu dient in ausgiebiger Weise der Briefwechsel, der sie mit Freunden aus etwa 30 Ländern verbindet. Enge Verbindungen unterhalten die Freunde des Bezirkes auch zur Kommission der sowjetischen Esperantisten in der Gesellschaft für Freundschaft und kulturelle Verbindungen mit dem Ausland in Moskau sowie mit vielen Esperantisten in der Sowjetunion. Das Mitteilungsblatt für die Esperantofreunde im Deutschen Kulturbund „der esperantist“ wird von fast allen Mitgliedern und Kursusteilnehmern gehalten. Etwa 40 Exemplare jeder Ausgabe werden an ausländische Briefpartner gesandt, bei denen es sich, wie viele Zuschriften beweisen, wachsender Beliebtheit erfreut.

Quedlinburg

La ĉijaran Zamenhoffeston ni en Quedlinburg celebris la 15-an de decembro 1967 ankaŭ omaĝe al la GRANDA OKTOBRA REVOLUCIO, en la klubejo de la Kulturligo. Ni ankaŭ memoris pri la kuraĝa vjetnamia popolo, kiu kontraŭ la agresuloj atingas pli kaj pli grandajn venkojn. Ni deziras elkore, ke la usonanoj devas forlasi baldaŭ la turmentitan landon.

Post la saluto pere de la estro de la esperantistoj en la subdistrikto Quedlinburg, amiko Alois Jauernig, parolis instruisto amiko Johann Haupt el Neinstedt pri la kreinto de la lingvo, d-ro L. L. Zamenhof kaj li substrekis la konstantan antaŭenmarŝon de la movado, la etikan enhavon de la ideo de la interkompreniĝo kaj interfratiĝo.

Poste donis amiko Jauernig la parolon al la instruistino f-ino Marianne Roese por lumbildparolado pri la SSR Uzbekio, kie ŝi restis kelkajn tagojn en la ferio kaj kie ŝi havis bonegajn kontaktojn kun la tieaj pacamikoj. Oni invitis ŝin private, regalis ŝin per uzbekaj naciaj manĝaĵoj, kaj montris al ŝi la vidindaĵojn. La tiea grupano Polišĉuk estas televida inĝeniero kaj fakulo pri sonbendoj. Kaj iuvespere parto de la grupo kunvenis en loĝejo, kie amiko Polišĉuk prenis sonbendon, mikrofonon kaj li salutis nin tre kore, priparolis iomete la renkontiĝon kun nia amikino Roese kaj deziris ĉion bonan por la pacamantaj homoj en la amika GDR.

Poste salutis kelkaj anoj de la tiea grupo, plej ofte studentoj de la ŝtata uzbeka universitato en Taŝkento.

Ili eĉ kantis humurplenajn kantojn, finfine parolis amiko Polišĉuk ankoraŭfoje kaj li deziris bonajn kontaktojn, precipe ankaŭ per korespondado de niaj grupoj, vizito de aliaj s-anoj el Quedlinburg en la orientan kaj vizitindan Uzbekion. Ĉiuj ĉeestintoj ĝuis la treege maloftan eblecon, aŭdi per sonbendo amikojn el la tre fora Uzbekio en la USSR.

Kelkaj sciigoj kaj bondeziroj okaze de la festotagoj kaj nova jaro finis la belan kaj memorindan Zamenhoffeston. Alois Jauernig

Sebnitz

Im Sommer 1967 wurde auf Initiative des Deutschen Kulturbundes in Sebnitz eine Arbeitsgruppe ins Leben gerufen. Bereits im Herbst lief ein Sprachkurs an, an dem sich zehn Personen beteiligen. Die Gruppe will nach Beendigung des Lehrkurses Kontakt mit den Nachbarkreisen aufnehmen, um die Konversation auch nach außen zu pflegen. Erna Köhler

Ein Wort der Redaktion

Die Seiten „El la distriktoj" sollen nicht nur der Berichterstattung, sondern vor allem dem Erfahrungsaustausch zwischen den Bezirken, Kreisen und Zirkeln dienen. Wir wiederholen deshalb die Bitte, alle nennenswerten Ereignisse, Berichte über die Tätigkeit der Zirkel usw. der Redaktion „der esperantist" einzureichen. Überall dort, wo es noch nicht geschah, sollten die Bezirksarbeitskreise und Kreisarbeitsgruppen einen Sprachfreund beauftragen, die Berichterstattung zu übernehmen und die ständige Verbindung zur Redaktion zu halten.

Um die Arbeit der ehrenamtlich arbeitenden Redaktionskommission zu erleichtern, sollen die Manuskripte möglichst nicht mehr als 33 Zeilen mit je 60 Anschlägen haben. Unter Vermeidung von Wiederholungen und selbstverständlichen Geschehnissen sind die Berichte kurz und sachlich zu fassen.

Vivu amikeco inter soveta kaj germana popoloj!

Auf unser Gratulationsschreiben an die sowjetischen Esperantisten, anläßlich des 50. Jahrestages der Großen Sozialistischen Oktoberrevolution, erhielten wir mehrere Dankschreiben, von denen wir das nachfolgende den Esperantofreunden zur Kenntnis geben:

Karaj amikoj!

Ni ricevis vian gratulan leteron okaze de la 50-a datreveno de la Granda Oktobra Revolucio. Nin tre ĝojigas kaj entuziasmigas via solidareco kun ni, vi frateca rilato al nia soveta popolo, via aprezo de la liberiga rolo de Ruĝa Oktobro en historio de subpremataj popoloj, de laboruloj de tuta mondo. Ni fieras pri tio, ke niaj amikoj en GDR aprezas la avangardan rolon de la Komunista Partio de Sovetunio en progresigo de nia lando, en kiu ĉiuj homoj egalrajte kaj pace laboras por la bono de la popolo.

Ni tre kontentas, ke la revoluciaj tradicioj de Karl Marks, Fridriĥ Engels, Clara Cetkin, Roza Luksemburg, Ernst Telman k. a. elstaraj revoluciuloj — gefiloj de germana popolo vivas en koroj de germanaj popolanoj, kiuj konstruas socialismon en GDR, kiuj staras en unuaj vicoj de progresiva homaro, batalas por paco.

Ni tutkore dankas vin pro la frateca gratulo kaj amikeco, pro la varmaj sentoj al nia popolo, pro la internacia proleta solidareco, pro la varmaj bondeziroj, kaj reciprokas.

Vivu amikeco inter soveta kaj germana popoloj! Prosperu Germana Demokratia Respubliko!

Kun varmaj amikaj bondeziroj.

Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj

Prezidanto
Prof. Dr. E. Bokarev

Sekretario
A. Makowskij

Muzeo Ciolkovski

En Kaluga, Soveta Unio, oni antaŭ nelonge inaŭguris kosmonaŭtikan muzeon nomitan memore al unu el la pioniroj de kosmonaŭtiko, Konstantin Eduardoviĉ Ciolkovski (1857—1935). La inaŭguro koincidis kun la 10-jara datreveno de la lanĉo de la unua artefarita satelito. La muzeo enhavas grandan kolekton da objektoj rilataj al kosmonaŭtiko, aviado kaj raketa tekniko, i. a. la unuaj sovetaj eksperimentaj raketoj lanĉitaj en 1933, la sputnikoj kaj lunikoj, la aŭtomata interplaneda stacio Venuso kaj la kosmoŝipo Vostok, en kiu Gagarin unuafoje veturis en la kosmon, en aprilo 1961. La muzeo posedas ankaŭ elektronan „Informan Servon", kiu kapablas respondi 800 demandojn pri la kosmo.

K. E. Ciolkovski estis konata ankaŭ pro sia interesiĝo pri la lingva problemo. En 1934 li membriĝis al Sovetrespublikara Esperantista Unio.

(Laŭ Informa Servo de UEA)

5-a Internacia Pedagoga Esperanto-Seminario en Szeged (Hungario) 10—20. aŭgusto 1968

En tiu ĉi jaro jam la kvinan fojon Hungara Esperanto Asocio aranĝos la seminarion en Szeged por pligrandigi la lingvajn, movadhistoriajn, literaturajn kaj metodikajn konojn de la partoprenantoj. El la programo: Antaŭtagmeze studhoroj, posttagmeze kaj vespere abunda kaj varia kultura prizorgo. I. a. vizito de la opero Aida, en kiu rolas k kunagas pli ol 500 personoj. Manĝado: trifoje tage. Loĝado: en 4-litaj ĉambroj de moderna studenthotelo. Informoj haveblaj per la adreso:

Esp.-Seminario, Szeged, Vörösmarty utca 7

An unsere „Paco"-Abonnenten

In letzter Zeit erreichten uns oft Anfragen, die sich auf die zum Teil verspätete Lieferung der Zeitschrift „Paco" bezogen. Wir möchten auf diesem Wege daran erinnern, daß dieses Organ der Esperanto-Weltfriedens-Bewegung jeden Monat in einem anderen Land erscheint und der Druck selbst unter meist schwierigeren Bedingungen, als es in der DDR der Fall ist, erfolgt.

Unter Berücksichtigung dieses Umstandes werden Verzögerungen in der Auslieferung erklärlich.

Da der Bezug dieser Zeitschrift ein echter Beitrag unserer Esperantisten im Kampf um den Frieden ist, bitten wir unsere Sprachfreunde, ihrem Abonnement treu zu bleiben und die oft zwangsläufig eintretende Verzögerung in der Auslieferung in Kauf zu nehmen.

ĈSSR:

Esperantista kulturfestivalo en Opava 1967

La festivalon ĉeestis entute 330 geesperantistoj, inter tiuj 36 alilandanoj. Krom ĉeĥoj kaj slovakoj alveturis samideanoj el Pollando, Sovetunio, Bulgario, Hungario, Aŭstrio, Germana Demokratia Respubliko, Jugoslavio, Nederlando, Britio kaj Usono.

Per interesegaj paroladoj de eminentaj ĉeĥoslovakaj esperantistoj — prof. Miloš Lukáš kaj d-ro Tomáš Pumpr — kaj bela ekspozicio el verkoj de ĉeĥoslovakaj artistoj — esperantistoj — Nacia artisto Martin Benka kaj artskulptisto V. Havel fariĝis la festivalo ne nur altranga esperantista aranĝo, sed grave kultura entrepreno por la tuta urbo Opava kaj ties distrikto ĝenerale.

Am 30. Dezember 1967 verstarb der erfahrene und eifrige Esperantofreund

Genosse
MAX RUDOLF

im Alter von 65 Jahren. Gen. Rudolf erlernte 1922 Esperanto, hat sich seit dieser Zeit in den Dienst der Esperanto-Arbeiterbewegung gestellt und viele Lernzirkel geleitet.

Die Kreisarbeitsgruppe Riesa verliert mit ihm einen ihrer Besten. Sein Tod hat eine schmerzliche Lücke gerissen.

F. R.

La 10-a Soveta Esperantista Junulara Tendaro okazos somero 1968 en Azio en la Altaja-montaro, apud Barnaul. Interesuloj turnu sin al

A. Gonĉarov, p. k. 11, **Barnaul/Sovetunio**

En ČSSR aperis la 52a Esp.-poŝtmarko

Al propagando de la Tutmonda Ekspozicio de Poŝtmarkoj PRAGA 1968 aperis en oktobro 1967 serio de 6 + 1 poŝtmarkoj. La pm kun la plej alta valoro 5 Kĉs estis presita en kvarblokoj, sur la pm aperas panoramo de Prago, moderna aviadilo TU 134, la nomo de la lando kaj la valoro. La supre videbla teksto troviĝas meze de la folio sur kupono kun aerpoŝta kaj filatela motivoj. Datoj: 5 Kĉs, kvinkolora: flava, ruĝa, hel- kaj malhelblua, nigra.

Dentumo 13½ : 13¼, bildo vertikala 40 × 50 m/m.
Aŭtoro: Jaroslav Lukavský, gravuristo: Josef Herčik.

PRAGA 1968: La estraro de la PRAGA 1968 informis, ke ĝi akceptis ekspozi la filatelan objekton „Esperanto“ de nia amiko Burmeister. Kiel dua objekto pri la Internacia Lingvo estos videbla en la PRAGA 1968 tiu de s-ro Bartošik el Praha. Ambaŭ objektoj estis distingitaj per arĝentaj medaloj dum la nacia pm ekspozicia en Karl-Marx-Stadt 1967. Al ambaŭ ni deziras sukceson! La ekspozicio estraro invitas ĉiujn filatelistojn al vizito de la PRAGA 1968, kiu okazos de 22a junio ĝis 7a julio 1968.

juna esperantisto

Karaj gejunuloj!

Jen nia forumo!

Ĝi estu spegulo de la junulara Esperantista-vivo en GDR!
Ni alvokas vin, per kontribuoj kiel seriozaj kaj distraj artikoloj, raportoj, proponoj, kritikoj, ŝercoj k. s. subteni la formigon de tiu ĉi paĝo.

Ĉiu organizaĵo nepre bezonas konstante junajn freŝajn fortojn, kiuj en kunlaboro kun la spertaj batalantoj prosperigas la agadon. Tiaj fortoj, certe aŭkaŭ troviĝas inter la Esperantistaro ĉe ni.

Via afero estas, en tiu ĉi senco en la kadro de niaj laborgrupoj de la Germana Kulturligo esti motoro.

Ankaŭ ĉe ni Esperantistoj validas la slogano:

La junularo estas la mastro de morgaŭ!

Aŭtuna junular-renkontiĝo en distrikto Karl-Marx-Stadt:

Der Bezirksarbeitskreis Karl-Marx-Stadt bereitet ein Treffen junger Esperantisten vor, das Anfang Oktober an einem Wochenende an einem schön gelegenen Ort im Bezirk stattfinden soll. Das Programm sieht neben interessanten Vorträgen kulturelle Vorführungen, Sportwettbewerbe usw. vor. Selbst das beliebte „kampeja fajro“ wird nicht fehlen.

Die Karl-Marx-Städter Esperantofreunde rufen die jungen Esperantisten aller Bezirke auf, dieses Treffen zu besuchen und je nach Möglichkeit aktiv an der Programmgestaltung mitzuwirken. Interessierte Freunde schreiben zweckmäßigerweise gleich an:

Deutscher Kulturbund
Bezirksarbeitskreis der
Esperantofreunde der DDR
90 **Karl-Marx-Stadt**
Otto-Nuschke-Straße 6

Nova disko

En la popola Respubliko Bulgario aperis altkvalita disko kun originalaj modkantoj en Esperanto. Kantas la profesia kantisto kaj konata esperantano Miŝo Zdravev. Sekvajn titolojn vi povas aŭskulti: „Bonan nokton!“, „Mia Kubo“, „Steletoj“, „Ludvika Aleksandra“. Partoprenintoj de la TEJO-Kongreso en Vraca 1963 certe rememoras pri la subĉiela balo, kie Zdravev plenumis siajn proprajn kantojn.

El nia moderna literaturo:

„Ĉu kajero estas frukto?“

„Ĉu Aŭstralio estas besto aŭ kontinento?“

Klariga respondo:

„Ne, Esperanto instruiĝas ankaŭ al normalaj homoj!“

H. E.

Instigo

Kiu jam kartludis per Esperanto?

Kiu tradukadas modkantojn?

Kiu jam aktive uzis Esperanton dum flirto?

Viajn spertojn ni publikigos post raporto!

distro

Rimarko de la redakcio pri la satira felietono: „Kontraŭtalpa Raporto n-ro I".

1. **TALPO** — ne nur estas zoologia estaĵo, sed ankaŭ speco de esperantisto.

2. **TALPO** — laŭ zoologia vidpunkto estas kvarpieda. La esperantistaj talpoj ekstreme malofte kvarpiedas, ĉar la plejmulto apartenas al . . . abstinenculaj rondoj.

3. **TALPO** — apartenas al la speco de la mambestoj. Ankaŭ la talpajn esperantistojn sučigas la penso pri „finvenko", „interna ideo", „majstro" . . .

4. **TALPO** — ne estas fibesto kaj ankaŭ niaj homaj talpoj nur ŝajnagadas.

5. **TALPO** — estas blinda. Bedaŭrinde ankaŭ esperantistaj talpoj iom malklare vidas rilate la evoluon de nia mondo kaj de la Internacia Lingvo „Esperanto".

6. **TALPO** — ordinare mutas. Tamen ni volontege akceptas protestleterojn de niaj dupiedaj talpoj. Ili estu estonte legitimilo pri TALPECO!!!

Kontraŭtalpa Raporto No 1

Ekzistas talpoj, ĉeftalpoj, honoraj talpoj, patronaj talpoj, dumvivaj (?) talpoj, talpologoj, eĉ talpistoj — certe ankaŭ talpidoj kaj sekve ankaŭ talpinoj.

Ili certe ankaŭ dum tiu ĉi momento fosadas obstine kaj jam multajn fekundajn sulkojn detruis. Ilia laboro — hodiaŭ modernigita kaj eble eĉ mekanigita — ŝajnigas neceson de agado.

Tamen la blinda subtera, subsocia agado plejofte maleksplodas en paperŝmirujoj de altaj instancoj kaj oficejoj (ĉu tio estas la tn. „paperkanonoj"?). Kaj -plej malgaje- ili ankaŭ vivetas en nia respubliko.

El ĉio ĉi elkreskas la neceso de kontraŭtalpoj, kontraŭĉeftalpoj ktp. Honoriginte min mem per la titolo „Kontraŭtalpo n-ro 1 (KTI), iranta la kontraŭtalpan vojon en la tutmonda Esperanto-movado, mi malfermas bataleton kontraŭ niaj subdistriktaj, distriktaj kaj superdistriktaj talpaj Esperanto-amikoj.

Cetere — mi ne pretendas esti vortludanto aŭ humoristo, eĉ ne konkuranto de la pseŭdonimuloj el la bestaro, svarmantaj tra la internacia Esperanto-gazetaro. Sed kontrapunkte al diversaj tro seriozaj Esperanto-revuoj (mi ne opinas „der esperantist"!!) mi deziras esti traktata. Jen ĉio! Hodiaŭ min honorigis s-ro d-ro Verdmani — specialisto pri mensaj kaj nervaj malsanoj — per mallonga intervjuo:

KT I: „S-ro d-ro, vi jam kelkajn jarojn apartenas al la Esperanto-amikaro en la Germana Kulturligo de la Germana Demokratia Respubliko. Tamen vi ĝis nun ne aperis aktive en subdistriktaj aŭ distriktaj laborrondoj de la Esperanto-amikoj.

Ĉu vi povus noti por niaj legantoj la kaŭzojn?

s-ro d-ro: „Ho jes! Volonte! Envere mi partoprenis — nome inkognite! Dum preskaŭ du kaj duona jaroj mi kolektis ampleksan kaj bazan materialon -lige kun mia profesio- en la kunsidoj de la subdistriktaj, distriktaj ktp. laborrondoj de la ktp."

KT I: „Ĉu vi preparas sciencan verkaĵon per ĝi?"

s-ro d-ro: „Ho jes!"

KT I: „Ĉu vi jam nun povus malkaŝi kelkajn bazajn ideojn de via certe epokfaranta ellaboraĵo?"

s-ro d-ro: „Ne tro volonte! Tamen, ĉar temas pri „der esperantist" — pro ties seriozeco — mi alude donos kelkajn klarigojn. Se estonte la redakcio permesos, mi volonte kontribuus per artikoloj primedicinaj lige kun la rezultoj de miaj esploroj."

KT I: „Vi scivoligas min!"

s-ro d-ro: „Nu jes, do jen:

La baza kaj unua rimarko mia en la esperantistaj kunvenoj estis, ke ne ekzistas nur „esperantist" — nocio tro elasta kaj tro ampleksa. Mi do devis apliki kelkajn sistemojn diferencigajn:

„Talpoj — talpadorantoj — esperantistaj edzinoj — neesperantistaj batalantoj (simpatiantoj) „aŭ pli ekzakte medicine: „sklerozitaj dikkapuloj — nesklerozitaj dikkapuloj — maniaj disputemuloj — deprimaj maldisputemuloj — eŭforiaj ĉionakceptantoj — ktp."

„Ĉu vi povas sekvi?"

KT I: „Certe, kaj mi eĉ konstatas similecon inter la sistemoj?"

s-ro d-ro: „Tre brave! Tre bone! Granda ĝojo por mi. Pri tio mi ankoraŭ intense okupiĝas kaj ne jam finis miajn esplorojn. Sed dua grava konstato mia estis pri la aspekto de vitrinoj propagandcelaj, kiu devigis min envicigi ilin laŭ la monografio de prof. d-ro Rennert („Schizophrene Bildnerei") en la — kaj tio estis por mi granda surprizo — kategorion III de la skizofrenia arto, nome en tiun, kie la celo tute ne koincidas la formon kaj enhavon. Tre fruktodonaj estis en tiu rilato la montrofenestroj esperantistaj en Dresden kaj aliaj urboj."

KT I: „Viaj esplorrezultoj certe estos por niaj samlingvanoj tre forta tabako. Ĉu vi atendas protestojn?"

s-ro d-ro: „Tion mi jam pripensis. Mi decidis publikigi mian verkaĵon en senriproĉa, moderna Esperanto. Per tio mi evitas, ke la esploritoj min komprenas."

KT I: „Kiujn planojn vi nun proksime havos?"

s-ro d-ro: „Unue fini la komparan traktadon „La mensa situacio de esperantistoj talpaj kaj esperantistoj ordinaraj en komparo kun mezaj neesperantistoj". Poste mi energie okupiĝos pri „Infana trajto de la hodiaŭa Esperanto-movado" kaj „Stranga fenomeno: Ĉiu Esperantoparolanto — Mondreformanto". Mi lastlaste volas emfazi — por eviti miskomprenojn inter viaj legantoj — ke kiel kuracisto mi okupiĝadas pri malsanuloj por sanigi ilin. Sanuloj certe ekzistas flanke en nia movado. Tamen mi ne havas tempon por serĉi ilin."

KT I: „S-ro d-ro Verdmani, nome de niaj abonantoj mi dankas vin kaj esperas daŭran sanigan kontribuon en nia revuo."

Miaj karoj! Jen mia starto. De via reago dependas mia forto. Se vi kontribuas amase, ni resalutos nin en sekva numero.

KT I

Sporta Konkurso

okaze de la XXI Internacia Biciklista Pac-konkuro

Lige kun la okazonta de la 9 ĝis la 24 de majo 1968 Internacia Biciklista Pac-Konkuro Berlino-Prago-Varsovio, Pola Radio aranĝas por siaj auskultantoj Grandan Sportan Konkurson. En nia Konkurso oni devas respondi du demandojn:

1. **Diru la naciecon de biciklisto, kiu okupos la unuan lokon en la definitiva individua klasifiko de la XXI Biciklista Pac-Konkuro.**
2. **Nomu la ŝtatojn, kies teamoj okupos la du lauvicajn unuajn lokojn en la definitiva kolektiva klasifiko de la Pac-Konkuro.**

Inter la partoprenantoj de la Konkurso, kiuj alsendos trafajn respondojn estos lotumitaj premioj kaj memordonacoj, kiel: senpagaj alvenoj por 12-taga restado en Pollando inkluzive atrakcian ekskurson tra nia lando, elfaraĵoj de la pola popola arto, diskoj kun pola simfonia, popola kaj distra muziko, polaj poŝtmarkoj kaj aliaj.

La respondojn oni devas sendi ĝis la 16 de majo 1968 (decidas la dato de la poŝta stampo) al la adreso: Pola Radio, Varsovio, poŝtkesto 46, Pollando. Kun la kromnoto „Sporta Konkurso". Ni petas legeble kaj precize skribi la antaŭnomon, nomon kaj plenan adreson. Oni rajtas sendi plurajn respondojn, sed ĉiun sur aparta, afrankita poŝtkarto.

Komencante de la unuaj tagoj de aprilo en la disaŭdigoj de la Pola Radio estos prezentataj detalaj informoj pri la biciklistaj teamoj startontaj en la XXI Pac-Konkuro. Kaj dum la daŭro de la Konkuro ni disaudigados ĉiutage raportojn kaj komentojn pri la biciklista rivalado okazanta sur la vojoj kondukantaj el Berlino tra Prago al Varsovio. Ni atentigas, ke la respondojn oni rajtas sendi ĝis la 16 de majo 1968, sekve la partoprenantoj de nia Konkurso havos multe faciligitan taskon pro la fakto, ke ili jam konos la rezultojn de la unua semajno de la Pac-Konkuro kaj orientiĝos tute bone pri la prepariteco de la unuopaj teamoj kaj biciklistoj.

Komunikon pri la rezultoj de la Konkurso ni anoncos la 16 de junio 1968, en nia ĉiutaga programo en Esperanto. Krome ĉiuj partoprenantoj de la Konkurso ricevos skribitajn informojn pri ĝia rezulto.

Ni invitas vin partopreni la Konkurson kaj deziras bonŝancon.

POLA RADIO

Krucenigmo



Ĉiuj radikoj estas troveblaj en la Plena Vortaro. R = radiko sen finaĵo.

Horizontale: 1) Pola danco; 4) Malmoligi; 8) Papera folieto, sur kiu oni skribas ian noton; 9) Cifero; 11) Akuta kaj pika ekstremo; 12) Armea estro; 13) Nombro dividebla nur per si mem; 15) Resuma; 17) Honoraj nomoj montrantaj rangon ktp.; 20) Superokula hararo; 22) Kolektiva; 23) Artefarita medikamenta likvaĵo (R): 24) Antikva greka monereto; 25) Frukto, kiu liveras bonan oleon.

Vertikale: 1) Vojeto en arbaro; 2) Ŝovi la langon sur io; 3) Aparato por produkti elektromagnetajn oscilojn; 4) Granda, dikhaŭta mamulo vivanta en afrikaj riveroj; 5) Vegetaĵo el la familio de umbelacoj (R); 6) Eligi bruon, spirante dum la dormo; 7) Sankta bildo, pentraĵo; 10) Havi efektivan rezulton (R); 14) Neklarvida, neantaŭzorgema (R); 15) Longa glavo; 16) La rakonta poezio; 18) Direkti la ŝipon al la direkto de la vento; 19) 12 monatoj; 21) Tuko uzata ĉe ŝipo movata de vento (R).

(Solvo en la sekva numero.)

Cetere:

C i m b a l o ne estas balo de cimoj — sed simpla muzikinstrumento.

La ĝ i r a f o havas longan kolon, kaj tamen ĝi ne estas k o l e g o.

A m u z o ne nepre signifas a m - u z o .

Recenzoj

I. Fekete: VUK

84 Seiten, Format 12,2 × 18 cm, Preis 7,80 M. (siehe Anzeige S. 32)
In diesem Tierroman erzählt Istvan Fekete, der einer der meist gelesenen ungarischen Schriftsteller ist, von einem jungen Fuchs und von dem Tierleben im Walde. Sein Vuk ist ein mutiges Füchslein, das seine Familie heldenhaft verteidigt. Zunächst lernen wir seine Eltern kennen, die Tag und Nacht unterwegs sind, um ihre acht hungrigen Jungen mit Nahrung zu versorgen. Die Jungen wachsen heran und der Augenblick kommt, wo die Glatthaut, ein Mensch mit einer Feuerwaffe kommt und den Fuchsbau entdeckt. Vuk wird gerettet, ein Schwesterchen wird gegriffen und die ganze übrige Familie kommt um. Das vereinsamte Füchslein Vuk muß jetzt von seinem Verwandten Karak viel lernen und an vielen harten Kämpfen teilnehmen, bis er endlich in der Fuchssippe einer der besten wird.
Diese kleine Geschichte ist fesselnd geschrieben und kann daher dem Leser von Esperanto - Literatur, auch dem Anfänger, empfohlen werden. Je mehr ein Anfänger liest, desto schneller lernt er die Feinheiten des Esperanto kennen. Den für ihn neuen Wortschatz des Buches lernt er schon auf den ersten Seiten kennen. Hat der Leser diesen durchgearbeitet, dann wird er auch den Rest des Buches schon leichter verstehen. Er lernt lesend, da sich die neuen Vokabeln während des Lesens in seinem Gedächtnis festigen.

Ebenso zu empfehlen sind die vom Neo-Lao-Haksat-Verlag herausgegebenen Erzählungen „Pluvas sur la arbaron", 88 Seiten, Format 13 × 19 cm.
Erfreulich ist, daß neben der hervorragenden Verlagstätigkeit des Fremdsprachen-Verlages in Hanoi, jetzt auch Esperanto-Literatur in Südvietnam (Verlag der Befreiung) und in Laos erscheint. Auf diese Weise lernen wir durch Erzählungen aus erster Hand den Befreiungskampf dieser Völker noch besser zu verstehen.
Um von ihren eigenen Verbrechen abzulenken und um das deutsche Volk zu zwingen, bis fünf Minuten nach zwölf zu kämpfen, verbreiteten die Nazis während des zweiten Weltkrieges in gewissenloser Weise ihre eklige verlogene Propaganda über angebliche Greueltaten der siegreichen vorwärtsdringenden Roten Armee. In genau so verbrecherischer Weise gehen die USA-Imperialisten nicht nur in Vietnam, sondern auch in Laos vor. Darüber erzählt Thao Boun Lin in fesselnder Weise in „Pluvas sur la arbaron".
Ein USA-höriger Söldner der MEO-Minderheit Lao Bi fällt auf diese Lügen herein und vergiftet beim Herannahen der Laotischen Befreiungsarmee seine eigene schwangere Frau. Das Dorf wird befreit und die Frau kann noch in letzter Minute von Ärzten der Befreiungsarmee gerettet werden. Sie gebärt einen gesunden Sohn. Als Lao Bi davon erfährt, kehrt er heimlich in sein Dorf zurück. Seine Frau überzeugt ihn zu bleiben, indem sie ihm erklärt, daß die Befreiungsarmee ihn nicht bestrafen würde. Er liefert seine Waffen ab und führt von jetzt ab ein ganz normales Familienleben.
Vier weitere Erzählungen sind in genau so interessanter Weise geschrieben. Das Buch ist sowohl für Literaturzirkel sowie auch für Zirkel für Fortgeschrittene zu empfehlen.
Wer sich über die Entwicklung in Laos während der letzten zwanzig Jahre genauer informieren möchte, dem ist das im gleichen Verlag erschienene (einschl. Bilderseiten) 50-seitige Büchlein „La Lao-Revolucio Dudekjara", Format 17 × 23 cm, unbedingt zu empfehlen.

Rudi Graetz, Handelsrat

KORESPONDDEZIROJ

Sovetunio

G. Ševčenko, inĝeniero, 33-jara, ul. K. Libknehta 15, kv. 32, **Dnepropetrovsk** (Ukraina SSR)

Butorin, kuracisto-hirurgo, abon. jaŝĉik 97, **Novosibirsk 99**

Boris Novogrudskij, studento, 19-jara, m. Čilanzar kv. 3, d 5 kv. 46, **Taŝkent 115,** Uzbekio

Anatolij Ivanov, 33jara, str. Poselkovaja 15—55, **Ulan-Ude 9**

Olja kaj Lena Jaroslavčeva, 13-jaraj, str. 2aja Plavlŝčikova 5, **Novosibirsk** 33

F-ino Kersti Kalmet, 20-jara, M. Gorki pst. 29, **Järvakandi Tehased,** Estonio

Sirje Loigom, 18-jara, Rabtŝinski 49—19, **Tallinn 6,** Estonio SSR

Dez. korespondi kun samaĝuloj el ĉiuj landoj, Andrej Scepetow, 9-jara, Pskovskoj obl. Oktobra prospekto, domo 45 kv 13, **Velikie Luki**

Studento de Politeknika instituto (supera lernejo), 25-jara, dez. kor. kaj interŝanĝi diskojn de populara kaj ĝaza muziko au rekompencas ilin per PI, artalbumoj, prospektoj, libroj au io ajn. Respondon garantias Boris Čuistow, 19 Sadowa St., **Jalta,** Krimeo

Dez. kor. Evgenij Martiŝčenko, pr-t Oktjabrskij 28/3 kv 9, **Velikie Luki,** Pskovskoj obl.

Esperanto-rondo de junulara klubo de internacia amikeco dez. kor. kun gejunuloj de ĉiuj landoj. Skribu al gvidanto: Spetrik Mark, str. Druŝba 10/52, **Benderi,** Moldavio

Letervespero kaj Esperanto-ekspozicio okazos en majo pri temo: Esperanto en batalo por la paco". Respondo garantiata, postsekva korespondado dezirata. Ĉiujn materialojn bonvolu sendi laŭ la adreso: Esperanto-Rondeto, Klubo de Internacia amikeco ĉe Pionirpalaco je la nomo de V. I. Lenin, str. K. Marksa 19, Taŝkent, USSR

Vasilij Vasiljevič Grigorenko, dez. kor. kun studentino aŭ instruistino, kiu interesiĝas pri rusa lingvo. Adreso: Čapajevka p. o. Radionovka, rajon **Velikaja Bagačka,** Poltova oblast Ukrainio

Esperanto-societo ĉe la Moskva Universitato serĉas kontakton kun eksterlandanoj. Skribu tien!

Danio

Mi deziras trovi geamikoj por korespondo en GDR. R. Knudsen, Fjordgaardsvej 5, **4300 Holbäk**

Hungario

20-jara mi dez. kor. kun gejunuloj en Esperanto, franca, soveta, aŭ hungara lingvoj. Interesas min sporto kaj muziko. Interŝanĝas bildojn diversajn. Mihaly, Fekete, Ozd. Tanesics t. „E" ep 2/3

László Nagy, komencanto, 23-jara teknikisto, dez. kor. pri ĉiu temo. urb. Kiskunfélegyháza str. 18, **Zrinyi**

Jugoslavio

26-jara, elektristo, dez. kor. kun GDR-anoj spri sporto, filmo interŝanĝas pk., diskojn kaj suvenirojn. Respondo certa! Zlatković Mirko, Marŝala Tita 17, **Lapovo I**

Pollando

Serĉas interŝanĝon de PM (temoj: floroj, ruĝa kruz., ŝipoj, pentristoj, faŭno kaj unuetagaj kovertoj) kaj gazetoj, libroj, insignoj ktp. Jan Sigda, **Starachovice 1,** ul. Slowak'ego 17/11

Andreo Rajewski, maŝinkonstruinĝeniero, Centrum „C" Blok No 10m 43. **Krakow 28,** Nowa Huta, prefere kun inĝenieroj

Jan Kabala, oficisto, ul. Mickiewicza 18, **Piotrków Tryb,** Lodzkie, kor. pri kulturo, interŝanĝas pm-ojn, kulturaĵojn tutmonde

F-ino Mag. Inĝ. Marta Jeczmieniovska, Str. M. Fornalskiej Nr 12/23 Krakovo 6, dez. kor. kun inĝenieroj en GDR

GDR

Komerco-lernantino Christel David, 25 Rostock, Th.-Müntzer-Platz 21, komencantino, deziras interŝanĝi bildkartojn.

40 gekomencantoj kaj geprogresintoj dez. koresp. kun ĉiuj landoj per bele afrankitaj let., bildkartoj pri E.-pacmovado kaj turismo. Resp. garantiata.

Adreso: Esp.-grupo „Popolamikeco", Kurt Heeg, GDR 962 Werdau, Ziegelstraße 20.

Herausgeber: Deutscher Kulturbund (Zentraler Arbeitskreis der Esperantofreunde der DDR). Redaktion: 108 Berlin, Charlottenstraße 60. Fernruf 225991. — Verantwortl. Redakteur: Eugen Menger. Redaktionskommission: Otto Bäßler, Rudi Graetz, Rudolf Hahlbohm, Rainer Knapp, Erwin Schleusener, Willi Vildebrand. — Veröffentlicht unter der Lizenznummer 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.

Druck: Druckwerkstätte KG Glauchau

Karl-Marx-Buchhandlung

1017 Berlin

Karl-Marx-Allee 78/84

Aus dem umfangreichen Angebot unserer internationalen Abteilung empfehlen wir:

„Wir lernen Esperanto sprechen“ Taschenlehrbuch	M	6,00
Wörterbuch **Esperanto – Deutsch**	M	5,80
Boleslav Prus: **„La Faraono“** I–III. Romano	M	40,50
Georgi Karaslavov: **„Bofilino“.** Romano	M	4,40
Ivan Vazov: **„Sub la jugo“.** Romano en tri partoj	M	5,45
Imre Mádách: **„La Tragedio de l'homo“**	M	8,10
Kazimiers Brandys: **„Kiel esti amata“**	M	3,95
Julio Bághy: **„Koloroj“.** Novelaro	M	7,60
Stela Blagoeva: **„Georgi Dimitrov“.** Biografia Skizo	M	2,45
To Huu: **„Elektitaj poemoj“.** Hanojo	M	2,35
Leteroj el Sud-Vjetnamio. Bd. I–II, Hanojo zus.	M	2,35
Istvan Fekete: **„Vuk“.** Bestromano	M	7,80
Ferenz Sánta: **„Dudek horoj“**	M	9,35
Gyula Nemeth: **„Vojaĝlibro de Hungario“**	M	5,95
Eva Janikovsky: **„Ĉu ankaŭ vi scias“**	M	7,80
Ho Chi Minh: **„Tagkajero en prizono“**	M	1,10

Über weitere am Lager befindliche Titel informieren wir Sie gern.

Bitte fordern Sie unser Angebot an.